# *Eksterordinara sesio de la ?tata konsilantaro pritraktis strategiajn demandojn*




Havano,  jun 17(RHK) La ?tata konsilataro eksterordinare kunsidis  subgvide de ?ia prezidanto Esteban Lazo, anka? prezidanto de la insula parlamento por pritrakti la evoluon de la procezo iniciatita por korekti distordojn kaj akceli la ekonomion en 2024.

La kunsidon anka? prezidis la insula ?tatestro Miguel Díaz-Canel Bermúdez kaj la ?efministro Manuel Marrero.

La parlamentestro insistis pri neceso aktive partoprenigi la lo?antaron  "en ?i tiu ?losila procezo en la defendo de la konkeroj de la Revolucio ».

Tial la ?efministro Manuel Marrero Cruz emfazis, kiel en la lasta etapo klopodoj kaj gravaj analizoj estis direktitaj al fundamentaj aspektoj "plejparte celantaj korekti makroekonomiajn malekvilibrojn, pliigi la enspezon de fremda valuto per diversaj rimedoj, kura?igante nacian produktadon; same pri bezono  ordigi la funkciadon de la malsamaj formoj de ne?tata administrado.

La membroj de la ?tata Konsilantaro emfazis anka? la nunan situacion de konfronti?o kun perfortaj kaj spekulaj prezoj en la lando.

Vladimir Regueiro Ale, Ministro pri Financo kaj Prezoj, deklaris, ke lia agentejo kontrolis la situacion en ?irka? 6 provincoj kaj 33 municipoj en la lasta etapo, krom fari inspektadojn ?e podetala kaj pogranda prezoj inter aliaj agoj ene de la decidoj adoptitaj.

En la debato, li emfazis, ke hodia? necesas pli da kontrolo, postuloj kaj sistemeco pri ?i tiu temo, instigante efektivigi agojn por alfronti malobservojn de kio estas establita kaj kontroli ilian efikon konstante kun prioritato en la teritorioj.

En la kunsido de ?i tiu 17-a de junio, la ?tata Konsilantaro, uzante la povojn donitajn al ?i, konsentis alvoki respondeckunvenojn de la delegitoj al siaj balotantoj, en la periodo inter la 20-a de junio kaj la 15-a de novembro 2024.

Fine, Esteban Lazo Hernández raportis pri organizaj kaj preparaj aspektoj cele al la Tria Ordinara Periodo de Sesioj de la Nacia Asembleo de Popola Povo en ?ia 10-a Le?dona periodo.

Fonto: Radio Rebelde

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/357669-eksterordinara-sesio-de-la-stata-konsilantaro-pritraktis-strategiajn-demandojn

Radio Habana Cuba